

zas, ke la bonfarto de ĉiu homo reprezentigas per utila indekso. La sumo de tiuj utiloj do estas la sumo de socia bonfarto.

Grava problemo kompreneble estas, ke ĝenerale tiaj utiloj ne mezureblas, sed se ĉiuj homoj same taksus siajn utilojn, se ili povus elekti distribuojn kiel loteriojn (vidu supren) kaj se ili penus maksimumigi sian ekspektan utilon, tio egalas al maksimumigado de la sumo de utiloj individuaj en la reala distribuo, ĉar ekspekto ja estas sumo. Harsanyi (1955) montris, ke tia kriterio estas la unika, kiu kontentigas aron da tre ĝeneralaj aksiomoj.

### Økonomiske teoriar for rettferd

Artikkelen gjev ei oversyn over økonomisk teori for rettferd.

Med utgangspunkt i ei opphavelig stode vert sambandet mellom effektivitet og samrøystes avgjerder drøfta. Dette tener som bakgrunn for definisjonen av omgrepi samfunnskontrakt og grunnleggjande rettar. På liknande måte utvidar ein omgrepet likskap til sjalusifridom og rettferdig prosedyre. På grunlag av desse generaliseringane av effektivitet og likskap vert omgrepet rettferdig samfunnskontrakt definert.

Ein syner til slutt kva ulike føresetnader om dei grunnleggjande rettar som den rettferdige samfunnskontrakten byggjer på, har å seia for korleis ei rettferdig fordeling av resurssane i samfunnet ser ut.

## INTERKOMPRENĜO PER INTERAGOJ KAJ SENTOJ

Tyburcjuŝ Tybłewski\*

### 1. Enkonduko

Koni la homa psiĥon ŝajnas necesa al tiuj, kiuj relative ofte interagas en interpersonaj kontaktoj. Ĉiu el la kontaktoj sperteble valoriĝas, se iliaj partoprenantoj ne ignoras la leĝojn malkovritajn per psiĥologio.

Nuntempaj socipsiĥologoj prilaboris la sistemon alproprigadi gravajn verojn pri **kondutoj** kaj **afekcioj** dum kaj per t.n. **sentivigaj ekzercoj**. Proksimigi tiujn verojn, malgraŭ konsciata malfacileco (konfirmata fare de partoprenantoj), kaj raportoj pri propraj esploroj (ankaŭ kun esperantistoj) estas celo de la suba prezento, kiu eligas la plej koncernen parton el la pli vasta materialo (TYBLEWSKI 1984).

### 2. Kio estas la sentivigaj ekzercoj?

Inter la specialistoj estas uzataj paralelaj ĝiaj nomoj: “*interpersona trejnado*”, “*trejnado de sentiveco*” k.a., depende de la nuanca enhavo aŭ de la loka skolo.

Renkontiĝante kun aliaj personoj en elektita loko, garantiata trankvilon kaj oportunon, la partoprenantoj akiras eblecon doni kaj ricevi laŭtempe objektivigatan informadon pri si kaj pri la aliaj laŭ la principo: ĉiu al ĉiu kaj de ĉiu.

De la plej fundamentaj informoj ili transiras al la pli kaj pli komplikaj, ampleksante pli kaj pli profundajn tavolojn de la konscio; ili ankaŭ travivas pli kaj pli intensajn emociojn aŭ afekciojn, kaŭzitaĵoj de eldiroj kaj kondutoj de aliaj personoj. La spertoj, kiujn ili akiras, kondukas al **memperfektiĝo** — pli efika ol iu ajn, atingata per stereotipaj metodoj. La partoprenanto lernas pri si mem kaj pri rilatoj al la aliaj, rekonante:

– kiel oni perceptas lin (ŝin),

\* D-ro docento de mediplanado en AIS; Bartka Zwycięzcy 11/1, PL-58-500 Jeŝenia Góra.

- kiel ilia konduto stimulas lin (ŝin),
- kiel oni akceptas liajn (ŝiajn) opiniojn k.a.

Per la partopreno li (ŝi) pli kaj pli lertiĝas analizi siajn kondutojn, evoluigante en si penetremon koncerne sian kaj aliulan ekziston kaj agadon, konsciiĝante pri pli kaj pli da fenomenoj rilate al la personoj kaj la situacioj.

La partoprenant(in)o atingas **aŭtentecon** en la reciprokaj rilatoj; li (ŝi) estiĝas pli kaj pli natura kaj malpli sentas devon ludi rolojn aŭ porti maskojn antaŭ la aliaj.

La ekzercoj, (kiujn mi bonŝancis partopreni en Vääksey-Finnlando, Parizo, Rouen kaj Sête-Francio, Arjäng-Svedio, Tallinn-Estonio, Ondallaz kaj La Chaux-de-Fonds-Svisio, Antverpeno kaj Loveno-Belgio, Eringefeld-FRG kaj kelkloke en Pollando) evoluigas scipovon kunagi kun la aliaj laŭ la principo de egalrajta kunlaboro kaj kundependeco, limigante ies superecon aŭ subecon. La partoprenantaro povas alproprigi kapablon solvadi diversajn konfliktojn, kvazaŭ ili estus nur teoriaj problemoj — sen la tipa emocia malobjektivigo.

Oni lernas per farado, provado kaj spertado kaj ankaŭ per senvorta esprimado de siaj emocioj (*Vanden Bempt 1982*).

Tio estas proceso principe diferenca disde la konataj manieroj lerni. En la sento de psiĥa sekureco kaj respondeco la partoprenanto lernas konkludi pri kaŭzoj de siaj kaj aliulaj sentoj. Oni lernas ankaŭ koncentriĝi je siaj psiĥaj statoj kaj defendi ilin kontraŭ tro frua kaj sencela malkoncentriĝo. Oni ekkonas ankaŭ siajn malavantaĝojn kaj avantaĝojn, riskante pritaksi ilin kaj korekti siajn antaŭjuĝojn koncerne konsistojn de la mondo.

La partoprenant(in)o kunestas ankaŭ ĉe la proceso de aliula evoluado rezulte de la komunaj spertoj.

Granda efikeco de tia lernado<sup>1</sup> konsistas en tio, ke anstataŭ — laŭ la mondskala rutino — sciiĝi de alia persono: “kiel mi kondutas en ies pritakso”, oni atingas ekzemple:

- komprenon de siaj sentoj en difinitaj situacioj;
- orientiĝon pri tio, kiuj interpersonaj eventoj elvokas la difinitajn emociojn;

- kiel niaj kondutoj estas akceptataj kaj komprenataj fare de aliaj personoj;
- kiuj alternativaj kondutoj elekteblas.

La gvidanto (trejnanto, iniciatanto) ne donas decidajn respondojn, kiel tion faras instruisto, estro, ĉefo k.s. Li helpas krei etoson de la fido kaj intensa penetrado por analizi siajn kaj alies eldirojn kaj kondutojn. Dank' al tio, en la grupo estiĝas pretemo helpi kaj subteni; facileco riski, dubi kaj stremi al objektivema rekono de la psiĥa kaj socia realoj.

### 3. En kio konsistas taŭgeco de sentivigaj ekzercoj?

Kvankam la ekzercaro okazas en specialaj kondiĉoj, ilia pruvita utileco transiĝas en la ĉiutagan vivon pro tio, ke ili ne nur liveras la difinitan scion pri konsistoj de la homa psiĥo, sed ĉefe donas kelkajn scipovojn aplikeblajn en la reala socia vivo. Precipe taŭga estiĝas pli bona memkonscio kaj kapablo *aŭskulti* kaj *esprimi* ideojn. Por nemalmultaj partoprenintoj la scipovo estiĝas fundamento de novigita rilato al iuj gravaj aferoj kaj fonto de korektitaj kondutoj kaj sintenoj, kiuj povas modifi eĉ firmigitajn antaŭjuĝojn.

Tamen (antaŭ ĉio) efikecon de la ekzercaro oni rekonas en ŝanĝo de sia rilato al viv-taskoj kaj -celoj kaj en proksimigo de la viviperspektivo.

Tiu taŭgeco manifestiĝas ĉefe en la utiligo de la pensado pri si mem, por anstataŭigi porokazajn celojn per la pli perspektivaj, la supraĵajn — per la pli profundaj kaj en pacienca atendado de la pli ampleksa rezulto, kiam iuj agoj ne kunportis tujan supozitan kontentigon aŭ plezuron.

La ekzercaro influas ankaŭ pli racian disponadon pri energio. Ĝi faciligas mempritakson kaj rekonon de la energiprovizado, por pli racie mezuri ĝian disponadon; ĝenerale ja oni konstatas eĉ malŝparadon de sia propra energio. Tiu kapablo videbliĝas precipe dum t.n. **streso**<sup>1</sup>, kiam ĝi faciligas forigon en malpli longa tempo ol rutine.

Alia utilo, konfirmata de esploroj, estas intensiĝo aŭ ekesto de t.n. **sentivo** de la partoprenantoj, kio gravas en ĉiu grupa kunvivado.

E. ARONSON (1972, p. 337-338) konsideras:

Miaopinie, se iu unusola sperto en la grupo kaŭzas, ke la homo

sentas sin pli impresiĝema, pli sentiva, pli komprenema, pli tolerema ktp. (...), tio estas sufiĉe argumento, por ke la grupoj ekzistu kaj ekzercu sin. Se, krome, la efikoj daŭras dum multaj monatoj, estas malfacile argumenti, ke partopreno en la grupo ne estas vera kaj signifa evento en la vivo de la unuopul(in)o.

Nepritakseblan taŭgecon montras la sentiviga ekzercaro (se sufiĉe profunda kaj respondeca) en la emocia edukado de la personoj, ĝenerale ja neglektata, kvankam necesega, *por plibonigi la interpersonajn rilatojn* en la socia vivo (REYKOWSKI 1974, ZABOROWSKI 1977, p. 146-150).

Ekzistas ankaŭ pravigitaj motivoj por konstati, ke parto de la fiaskoj de socialisma sociordo efikas el la ignorado pri leĝoj de afekciado (ZABOROWSKI, l.c., TYBLEWSKI 1980, 1984) ensembla amasa kunvivado.

#### 4. Raporto pri la esploro

En la raporto ni prezentos informojn pri la esploritaj kuracistoj kaj scienclaborantoj el Instituto de Socia Medicino el Wrocław kaj pri esperantistoj, kiuj partoprenis la ekzercadon. Kvankam ne ĉiuj ekzercoj kun ili estas mezuritaj kaj priskribitaj, la observoj kaj la notitaj opinioj respeguliĝos en ĉi tiaj konkludoj kaj ĝeneraligoj. La renkontoj kun kuracistoj okazadis en montara rifuĝejo «Samotnia», en la Centro por Perfektigi Kuracistojn<sup>3</sup> kaj en privataj loĝejoj. Esperantistojn la subskribinto renkontadis en diversaj lokoj (menciitaj en ĉapitro 2.) kaj en Międzygórze dum Internacia Feriado en 1976. La partoprenantoj pritaksis i.a. tiel nomatan **klimaton** de la grupo, difinitan en 13 konstatoj, kies probablecon oni devis taksu laŭ la skalo 0-5 (de “neniam” ĝis “ĉiam”). La rezultojn bildigas tabeloj 2. kaj 3. La donitaĵoj estas oridigitaj tiel, ke ili enhavas la pritaksojn — de maldekstra al dekstra — laŭ tabela sinsekvo de la partoprenintoj.

La mezvaloroj bildigas la grupan pritakson de tiuj “klimatoj”, kiujn formis la kondutoj kaj sentoj de la partoprenintoj (eventuale bonvolu trarigardi la 3-an ĉapitron).

Analizo de apartaj rubrikaj tabeloj 2. kaj 3. montras pritaksojn — ofte — ekstreme diversajn (de la plej proksimaj ĝis la malplej proksimaj en la realo).

Tab. 1 – PARTOPRENANTOJ DE LA EKZERCARO

| N-ro | Personnomo (nacieco)  | N-ro | Personnomo (nacieco) | N-ro | Personnomo (nacieco)     |
|------|-----------------------|------|----------------------|------|--------------------------|
| 1    | Annie (anglino)       | 18   | Danuta (polino)      | 35   | Veikko (finno)           |
| 2    | Hilda (anglino)       | 19   | Ewa (polino)         | 35   | Vim (svedo)              |
| 3    | Lilly (skotino)       | 20   | Halina (polino)      | 37   | Ante (estono)            |
| 4    | Yetti (belgino)       | 21   | Jaga (polino)        | 38   | Adam <sup>3</sup> (polo) |
| 5    | Marta (usonano)       | 22   | Janina (polino)      | 39   | Edmund (polo)            |
| 6    | Louise (francino)     | 23   | Lidia (polino)       | 40   | Stanisław (polo)         |
| 7    | Pauline (francino)    | 24   | Maria (polino)       | 41   | Tadeusz (polo)           |
| 8    | Elma (finnino)        | 25   | Tamara (polino)      | 1    | Anna <sup>3</sup>        |
| 9    | Marja-Leena (finnino) | 26   | Arad (nederlandano)  | 2    | Barbara                  |
| 10   | Sirpa (finnino)       | 27   | Jan (ĉeĥo)           | 3    | Ewa (“la blanka”)        |
| 11   | Benita (estonino)     | 28   | Kris (anglo)         | 4    | Jurek                    |
| 12   | Sirje (estonino)      | 29   | Mervin (anglo)       | 5    | Krzysztof                |
| 13   | Virve (estonino)      | 30   | Odón (hungaro)       | 6    | Adam <sup>3</sup>        |
| 14   | Berit (svedino)       | 31   | Peter (anglo)        | 7    | Zbyszek                  |
| 15   | Britta (svedino)      | 32   | Zigismundo (hungaro) | 8    | Ela (“la nigra”)         |
| 16   | Stina (svedino)       | 33   | Aarne (finno)        | 9    | Ela (“la blanka”)        |
| 17   | Celina (polino)       | 34   | Tuovi (finno)        | 10   | Ewa (“la nigra”)         |
|      |                       |      |                      | 11   | Janusz                   |

Indiko: Ekpensu pri tio, kiel la grupanoj kondutas rilate vin. Ĉe ĉiu sube menciita konstato skribu la numeron, difinantan vian percepton de la grupo kiel tutaĵo:

- 5: “Mi povas atendi, ke ili ĉiam tiel kondutos”
- 4: “Tia konduto estus por ili tipa”
- 3: “Kutime ili kondutas tiel”
- 2: “Ili kondutas tiel malofte”
- 1: “Tre malofte ili kondutas tiel”
- 0: “Neniam ili kondutas tiel”.

Tab. 2 – KLIMATO DE LA INTERNACIA GRUPO (VIROJ)

| Pritaksoj        | Mez-valore | Ili:                          |
|------------------|------------|-------------------------------|
| 4344334445343534 | 3,75       | 1) parolas aperte             |
| 3333233433443344 | 3,25       | 2) komprenas min              |
| 3132241430323221 | 2,25       | 3) ne atentis min             |
| 3213343313121221 | 2,18       | 4) akceptas min               |
| 2301001340121123 | 1,50       | 5) malamas min                |
| 2101321142132110 | 1,56       | 6) miskomprenas min           |
| 1103353444131023 | 2,37       | 7) interesigas pri mi         |
| 443342553332334  | 3,37       | 8) etose helpas al mi         |
| 2211103511021103 | 1,50       | 9) silentas por ne tuŝi min   |
| 0444104325122113 | 2,31       | 10) scias, kiu mi psike estas |
| 3104225414232214 | 2,50       | 11) engrupigas min            |
| 33213-3535354332 | 3,20       | 12) prijuĝas min              |
| 3354405440433443 | 3,31       | 13) estas sinceraj rilate min |

Ekzemple, la opinio, ke la partoprenantoj “silentas por ne tuŝi min” (9) ĉe la viroj estis ekstreme malsama (de 0 ĝis 5), sed meze signifis, ke tio okazis malofte. Simile pri “ili estas sinceraj rilate min”, kvankam la pritaksoj ekstreme diferencis individue, la meza (ĝenerala) opinio signifis: kutima/tipa estas konduto.

Ekkonsciiĝo de la grupanoj pri iu aferstato, ekzemple ke ili estas pritaksataj fare de aliaj, aŭ ke la aliaj estas plene sinceraj ŝanĝiĝas rezulte de la opini-interŝanĝo en ĉeesto de aliaj personoj. Tio eblas dank’ al multfoja jesado aŭ neado koncerne ies esprimitan konvinkon. Pro tio, ke oni ĉerpas el la komunaj (ĉi tie kaj nun) spertoj, ili transformiĝas en la **kriterion**, korektantan subjektivecon de la juĝoj.

Se, malgraŭ tio, ies juĝo estas sensanĝa, tio povas signifi ĝian profundan internan (la psiĥan) kondiĉitecon, kies forto kaj daŭro determinas la konsantecon de la antaŭjuĝoj kaj sintenoj.

Rimarkindas, ke inter la viroj manifestiĝis la meza opiniaro, restanta inter la kutima kaj malofta maniero konduki rilate ilin. Ni rajtas interpreti tion kiel

singardan mankon de certeco rilate kondutojn de alietnaj fremduloj, kvankam iliaj deklaritaj intencoj estis ĉiam pozitivaj.

Tab. 3 – KLIMATO DE LA INTERNACIA GRUPO (VIRINOJ)

| Pritaksoj                 | Mez-valore | Ili: |
|---------------------------|------------|------|
| 5244353535535453554453345 | 4,08       | 1)   |
| 553443353533533443445533  | 3,76       | 2)   |
| 0123300134101201123221321 | 1,56       | 3)   |
| 5334453334533445355453445 | 3,84       | 4)   |
| 5222222011220421525233212 | 2,12       | 5)   |
| 0212103232140022533223122 | 1,92       | 6)   |
| 5124235343323223343233132 | 2,84       | 7)   |
| 5434455334335233551223243 | 3,48       | 8)   |
| 0234252535035131115231224 | 2,60       | 9)   |
| 5033320303225321344332143 | 2,56       | 10)  |
| 5334455315135333335423432 | 3,40       | 11)  |
| 0535105531002132334423431 | 2,60       | 12)  |
| 5144453033544235343443212 | 3,24       | 13)  |

Laŭ la virinoj “ili silentas por ne tuŝi min” okazis ĉe iuj ĉiam, ĉe aliaj neniam kaj ĝenerale: inter malofte kaj kutime. Sed la ekstreme malsama juĝo pri identaj eventoj ja mezureble videblas kaj konfirmas la subjektivecajn leĝojn de perceptado kaj sentado.

La konstato “ili engrupigas min” (11) ĉe kuracistoj (la tabelon ni ĉi tie ne prezentas) evidentiĝis tipa, dum en la internaciaj grupoj — malofta (vidu la mezvalorojn en ambaŭ tabeloj). La diferencon oni povas klarigi per malsameco de t.n. **socia distanco** aŭ de **socia ligo** (TYBLEWSKI 1977, 1978), kiuj estas pli sentebaj en unuetna grupo el en la interetna. Tio povas ankaŭ esti diversaj niveloj de sentiveco koncerne ĉeeston de la fremduloj, reprezentantajn malsamajn kondukstereotipojn.

La partoprenintoj aktivis ankaŭ en ekzercoj nomataj:

- tri sferoj de konscio,
- la forumo,

– konfesado en triopoj.

Dum la unua ili sidis aŭ kuŝis senmove, enprofunduĝante en aŭdataj sonojn, sentebajn emociojn kaj alvenintaj pensoj aŭ imagaĵoj. Dum la dua, ili montris kaj klarigis, kiujn bestojn, aromojn kaj florojn ili ŝatas, kaj kiujn ne. Dum la tria, trairante sinsekve de rolo de parolanto tra tiu de observanto ĝis tiu de aŭskultanto ili konfesis al si sentojn kaj pripensojn rilate sian partoprenon en la E-movado (rilate laboron de kuracisto en aliaj grupoj).

Ĉiu el la ekzercoj finiĝis per ĝenerala interŝanĝo de opinioj laŭ la principo: unu parolas, la aliaj atente aŭskultas. Rezulte la partoprenintoj ricevis eblecon korekti sia(j)n eraro(j)n kun la tendenco objektivigi kaj verigi la opinion. La eldiraĵoj diferencis laŭ jenaj kategorioj:

- tiuj, kiuj ne konfesis la personajn aferojn al ‘fremduloj’;
- tiuj, kiuj ĝis la fino restis rezervemaj, uzante neklarajn ĝeneraligojn kaj ne volonte aplikante la pronomon “mi” aŭ la konforman gramatikan formon (facile dirante: “oni...”, “ĝenerale estas sciante...”, “rimarkeblas, ke...”;
- tiuj, kiuj kun aperteco konfesis eĉ intimajn ideojn, senhezite uzante gramatikajn formojn kun “mi”.

La postekzercaj impresoj esprimiĝis en la konstatoj:

“Estis multe da varmo kaj amikecaj sentoj.” – “La homoj ne interesiĝis pri mi.” – “Ĉiuj provis domini.” – “La plejparto de la interparoloj preteriris la temon.” – “Mi ne partoprenis efektive.” – “Mi koleris kaŝe.”

La postekzercajn impresojn oni pritaksis laŭ 10-poenta skalo; jen ekzemplo de unu el ili:

Tab. 4 – “MI PROVIS ENGRUPIGI LA ALIAJN”

| Individuaj opinioj                 | Mezvalore           |
|------------------------------------|---------------------|
| 9 10 5 6 10 9 6 2 5 1 2 4 4 5 10 5 | $95 \div 16 = 5,93$ |
| 9 9 3 5 10 9 8 1 3 2 1 1 6 2 3 5   | $78 \div 16 = 4,87$ |

Laŭ 16 viroj unu situacio evidentiĝis pritaksebla per tiom malidenta poentnombro pro subjektiva influo de la persona intenco (“mi provis”).

La kunestado kun la aliaj dum la sinsekvaj ekzercoj permesis rimarki ĉefajn inklinojn, manifestiĝantajn en la elektitaj roloj. Ni ne prezentas ĉi tie la tabelon, kiu precize bildigas la “nomigadon”, sed ankaŭ ĉi-rilate konfirmiĝis **relativeco** de la pritaksoj, mezurebla poente. Ekzemple pri unu kvalito de la sama persono oni opiniis “absolute jes” (la koncepto-iniciatanto) aŭ “absolute ne”. Same atentofrapa malsameco esprimiĝis koncerne la rolon de la kunordiganto. Kvankam oni ĝenerale scias pri diferencoj, ilia precize bildigita skalo ŝajnas al la partoprenantoj la fenomeno malkovrita kaj per tio tre pensiga.

Ĉio ĉi okazas en la etoso de la komuna malkovrado, kio permesas travivadi en la samaj tempo kaj loko tre fortajn sentojn (de seniluziigo ĝis fascino). La komunaj atingaĵoj grandparte dependas de la gvidanto (trejnanto), pri kies taskoj ni citu el ARONSON (1972, p.330-332):

“La gvidanto estas nek terapeŭto, nek instruisto, nek plenumas iliajn funkciojn. Kutime li ne prezentas profundajn interpretojn pri konduto de la grupanoj, nek lekcias al ili. Antaŭ ĉio li estas membro de la grupo. Li ne restas distance de ĝi kaj ne kaŝas antaŭ ĝi siajn afekciojn. Alie ol ĉe terapeŭto, lia rilato al la grupo ne estas asimetria; ĝi ne konsistas sole en aŭskultado sen manifesti siajn emociojn; li devus ankaŭ ricevi retro-informon (“feedback”) de aliaj grupanoj. Tio povas esti la plej grava funkcio, ĉar servanta kiel modelo por la ceteraj partoprenantoj...”

La vasta citaĵo klarigas rolon de la gvidanto, akceptatan de la partoprenantoj diverse; la subskribinto spertis, ke poloj kaj finoj ne facile ĝin akceptis tia. En la polaj soci-realoj oni atendas de gvidanto senrezervajn decidojn — akorde kun la trudeme lanĉata modelo konduiti. Alie akceptis la rolon francoj kaj svedoj, senmire utiligante la eblecon kundefendi pri aktivado de la grupo.

Ni rezignas pri prezento de la statistikaj donitaĵoj, koncernantaj ĉiun ekzercon. Tamen, la eldiroj de la partoprenantoj, registritaj ĉe la fino de kelkaj sesioj, ŝajnas citendaj:

— “Kio min maltrankviligas? Manko de necesaj indikoj; manko de klaraj

celoj kaj metodoj en medicino. Manko de tempo por ĉio, eĉ por la interesiĝoj.”

- “Trankvilo, ĝojo por la infanoj, fido; mi konsentas, ke en la nuntempa medicino ni preteriras la homon; ni lasas lin sola al li... Mi ŝatas esti kuracisto.”
- “Estas gravaj aferoj, pri kiuj ni ĉi tie parolas. Mi diros, kio min plenigas. Plezurigas min la ĉeestado kun interesaj homoj; mi venadas, kvankam mi ne devas. Mi sentas un psiĥan komforton, la plezuron interparoli pri pli profundaj aferoj. De tie ĉi mi prenas la konfirmon de mi mem en la senco: mi estas mi. Ankaŭ ŝajnas, ke mi eligas iujn valorojn, kiujn vi akceptos.”
- “Laŭ miaj impresoj tio estas iaspeca festeno. Mi ne pensis pri iuj grandaj aferoj kaj mi bedaŭris, ke ni devis skribi, sed mi multon ordigis por mi mem. La plej grava estas tio, ke mi volus esti en pli supera nivelo por ion krei. Ĉiam ŝajnas, ke la homoj eliras el mia kabineto, atendante pli multe, kaj mi ankoraŭ ne scipovas tion.”
- “La ideo, kiu naskiĝis en mi ĉi tie: la homoj agas rutine, mem donante malmulton al la aliaj... Mi konkludas, ke la memdifino estas pli grava ol amo!”
- “Unu ĉi tie, la dua tie, kaj tamen komune! La pensoj koncernas nin ĉiujn; vi influas min pozitive kaj mi bezonas la spiritan kontakton. Mi povas veni al vi, kiam estas bone, sed ankaŭ, kiam ne. Antaŭe mi timis; jam ne plu. Mi evoluas, mi sentas tion; estas la sento de mia ‘mi’.”

El leteroj de la esperantistoj:

- “Mi opinias, ke estus bone, se mi ankoraŭfoje sekvus vian seminarion, por lerni iom pri mi mem. Mi tiom timis, ke mi ne povas naski miajn sentojn, ke tio ne povis helpi al spertado pri io nova. Mi pardonpetas, ke mi prezentis al vi nur negativajn flankojn de mia vivo, sed tiel estas. Mi foriris sen havi eblecon adiaŭi vin; mi devis foriri pli frue, ĉar amikino venis, por viziti min. Mi tute ne akceptis ŝin bone, ĉar per la pensoj mi estis ankoraŭ en Leuven. Mi tute ne estis gaja pro la reveno hejmen. Restis en mi multaj, multaj ideoj...”
- “Mi skribas precipe por danki vin pro via laborgrupo ĉe la IJK. Mi en la

socio. Espereble vi memoras min! Mi estas la brita partoprenintino. Saluton! Vere mi multon lernis dum la tuta kongreso, sed plejparte en via kurso. Nun mi ege ĝojas, ke mi partoprenis ĝin. Por mi la tuta sinteno de la grupo estis nova sperto. Ekzemple, trifoje mi povintus facile forfuĝi. Je la komenco, ĉar mi ne volus ĝeni la rondon. La duan fojon mi dubis, ĉar multaj homoj ne konsciis pri miaj internaj problemetoj — mia ĉiam provas kaŝi, kion mi vere sentas. Fine, kiam vi anoncis tiun ‘tuŝadon’, mi entute volis foresti. Jen la afero, pro kiu mi estos tre dankema. Imagu! Ĉe mi oni — la familianoj — neniam tuŝas unu la alian, ĉirkaŭbrakumas kaj nepre ne kisas unu la alian. Al mia patrino tia kontakto malplaĉegas. Fakte, ŝi ne interesiĝas pri emocioj, pri ‘amo’ aŭ similaj aferoj... Ĝis nun, tiu ĉi tuŝado estis zorgo por mi, ĉar kvankam mi multe emis al kutimiĝi, mi neniam sukcesis. Kaj tion mi spertis ĉe via grupo, ke mi nature, iel bone, interrilatis kun la aliaj. Mi neniam antaŭe parolis al iuj ajn pri tiuj aferoj. Tial mi ĝuis tiun etoson paroli senĝene. Do, vere, mi faris grandajn paŝojn per Esperanto! Jen mi sentas nun tiel bone, ke mi ne plu embarasiĝos i.a. pro ĉirkaŭbrakumado, pro la konfesado aŭ pro montrado de miaj emocioj. Mi kore dankas vin!”

- “Mi ŝatus redanki al vi pro la laborgrupo en Loveno. Mi revenis hejmen, ĉie konataj aĵoj kaj konata lingvo. Homoj ŝajnas esti pli bonaj ol kiam mi forlasis Zagrebon. Ĉu la suno brunigis ilin ĉiujn aŭ mi alimaniere vidas nun? Mi manĝas rubusberojn, floroj odoras, mi povus suferi, ĉar ne ĉiuj homoj rajtas je sama spaco. Mi povas facile imagi nian rondon: Borja, Kris, Ingvar, Wanda... Kiel agrable estis esti kune. Henri iam gastis en mia hejmo, nur en via laborgrupo mi malkovris, kiom agrabla li estas! Kiam ni adiaŭis nin per manoj interplektitaj rondmeze, mi havis la impreson, ke ĉiuj tenas ĝuste miajn manojn. Estis tute aparta sperto plori antaŭ ĉiuj, anstataŭ malfeliĉi al sia propra kuseno. Ĉe venonta tristo mi pensos pri la islandaj konsoloj. Mi dum la tuta belga restado bezonis ion similan kaj mi eĉ kuraĝis demandi Claude Piron, ĉu Ĝoja Karal havas fiksjajn deĵorhorojn... Hodiaŭ mi ne plu bezonas ŝin — mi malkovris vin. Ĉu troigo, se mi diros al vi, ke mi fartas tiom riĉe, kvazaŭ mi ricevus adreson de la Eta Princo persone — mi ja...”

- “Malofte mi sentas emon skribi leteron, estas unuafoje en mia vivo, ke tia forta deziro rilate skribadon regas min. Mi sentas min en situacio senelira. Mi simple vivas de jardekoj sen fariĝi mi mem. Mian korpon kaj ĝiajn bezonojn mi simple ne rekonis aŭ neglektis tiom, ke mi fariĝis preskaŭ nekapabla senti ĝin. Dum jaroj ekzemple estis por mi terura la seksa kunestado, kvankam mi ja ĉiam denove deziris ĝin, konsciante, ke li bezonas ĝin. Mi volis bonon por li, ne por mi. Fakte, tia emo bonfari al aliaj, neglekti min mem, trairas mian tutan vivon en ĉiuj sferoj. Aperis alia viro... Li sukcesis — aŭ ĉu mi mem? — ke mia tuta korpo akceptis lin. Li sukcesis ennervigi mian tutan korpon — kaj ĉiam denove tio okazis kaj okazas! Mi petegas, akceptu mian konfeson bone, kvankam ja estas ĝeno ricevi tion de preskaŭ fremdulino, sed en la grupo mi ne kuragiĝis paroli pri tio.”
- “Mi vere volas plian fojon danki vin pro ĉiuj bonaĵoj, kiujn vi alportis kune kun vi en mian hejmon. Vi ne povas — jes! — imagi, kiom vi helpis al ni malkovri en ni mem kaj en la aliaj la esencon de la komuna vivo. Imagu, ke kiam post la seminario mi venis en la lernejon, la gekolegoj demandis min, kio okazis al mi, ĉar mia vizaĝo ŝajnis radii kaj ili ĉiuj enviis min. Mi do iomete rakontis pri la seminario kaj ĝia efiko. Mi estis pli fiera ol infano! Mia vivo estas nun tiom riĉ- kaj feliĉ-plena, ke mi preskaŭ timas, ke ĝi ne estas reala — nur reva. Li kaj mi ankoraŭ nun ĉiutage malkovras unu la alian. Ne imageblas, kiel vi efektivigis tion! (Ne fariĝu vanta!)”
- “Nun, post via foriro plene sentiĝis efiko de la staĝo, kiun ni gvidis... Finfine en tiu lundo vespere evidentiĝis, ke bagatelaĵo por mi estis esencaĵo por ŝi. En tiuj postaj tagoj ŝi elmontris nekonatan energion. Mi mem — en la momento de via alveno — travivis iom deprimitan periodon. Via staĝo donis al mi intensan puŝon, sed iom post iom mi resinkis en deprimiĝon. Precipe mi havis zorgojn pri la fakto, ke mi ofte forgesis la nomojn de iuj, kun kiuj mi ĉiutage kunlaboras... Sed tio pasis. Eble via nova kurso donos necesan injekton?!”
- “Je la fino de hodiaŭa vespero mi deziras danki vin pro ĉio, kion vi alportis sum nia kunesto. Via lasta interveno intimigis la komunan eto-

son kaj okazigis tre interesajn interparolojn. Plezurigis min, ke ĉi-foje mia amiko Claude estis vere akceptita en la rondon. Mi sendas ĉi tiun leteron al Pollando kaj certe vi trovos ĝin post alveno hejmen. Mi esperas, ke vi havis bonan vojaĝon en Eŭropo, kaj ke la travivaĵoj inter ni helpas vin dum la ĉiutaga vivo.”

### Konklude

La prezentita materialo konfirmas, ke la kunestado de diversaj personoj en la sentivigaj grupoj kaj sekve la interkomunikado stimulas al intensa pensado kaj sentado (Vidu ankaŭ: TILMONT 1983). Rezulte de la interagoj la personoj akiras novajn scipovojn. La esploritaj personoj manifestis kaj rimark-eblajn antaŭjuĝojn kaj ankaŭ pretemon modifi ilin rezulte de la spertoj.

Karakteriza estis la pozitiva direkto de absoluta plejparto de la ŝanĝoj.

En la interretaj grupoj okazis forpuŝo pro timo antaŭ politika manipulado (ĉeĥo) kaj malfido al la partoprenantoj, kiuj ne montris klare rekoni la amikon el pasinta jaro (hungaro).

Multaj personoj ekkonsciis siajn limigojn. Kelkaj ekposedis novajn spertojn.

La emocia ekaktiviĝo de la partoprenantoj konfirmis, ke tia maniero interagi (kunagi) — direktita al la planita kaj racia strebado — favoras la memrekono kaj rekonon fare de la aliaj, apertante la individuan konscion por la sociaj fenomenoj.

En la unuetna grupo (gepoloj) nur unu persono konservis netuŝeblajn antaŭjuĝojn koncerne difinitan situacion (malfidon al superulo el la sama laborejo).

En la interretaj grupoj de geesperantistoj manifestiĝis la pretemo komune spertadi kaj malkovradi kaj la aperteco komune travivadi eĉ fortajn emociojn. Videblis ankaŭ la inklino analizi siajn kondutojn kaj — en kelkaj okazoj — modifi ilin.

### 6. Literaturo

ARONSON, E. (1972)

*Social Animal* – Freeman Comp., San Francisco.

BALES, R.F. (1950).

*Some Uniformities of Behavior in Small Social Systems.*

- Addison-Wesley, Cambridge, Mass.  
 JOHNSTAD, T. (1980).  
*Group Dynamics and Society.*  
 Olgeschlager, Gunn, Hain Publ. Inc., Cambridge, Mass.
- KOJC, M. (1967).  
*La lernolibro de la vivo.*  
 Internacia Esperanto-Instituto, Hago.
- MELLIBRUDA, J. (1976).  
*Program treningu interpersonalnego nauczycieli.*  
 IKN, Warszawa.
- PIRON, C. (1979).  
*Kiel personeco sin strukturis.* – SUK, Liège.
- REYKOWSKI, J. (1974).  
*Eksperymentalna psychologia emocji.*  
 Książka i Wiedza, Warszawa.
- ROŻEŃSKA, H. (1979).  
*Psychologiczne aspekty pracy lekarza podstawowej opieki zdrowotnej.*  
 «Zdrowie Publiczne» 10, Warszawa.
- SEYLE, H. (1977).  
*Stress without Disstress.*  
 Państwowy Instytut Wydawniczy, Warszawa.
- SZEWCZUK, W. (1979).  
*Słownik psychologiczny.*  
 Wiedza Powszechna, Warszawa.
- TILMONT, A. (1983).  
*Kune en la patrino varma nesto.*  
 «Kontakto» 1, 13-14, Rotterdam.
- TYBLEWSKI, T. (1976).  
*Trening interpersonalny.*  
 «Nowiny Jeleniogórskie» 40, Jelenia Góra.
- TYBLEWSKI, T. (1977).  
*Esti la interhoma.*

- «Pola Esperantisto» 4, Warszawa.  
 TYBLEWSKI, T. (1980).  
*Zanim powiesz: jestem chory.*  
 «Wiadomości» 2, Wrocław.
- TYBLEWSKI, T. (1984).  
*Afekcioj en turismo.*  
 «Scienca Revuo» 125-141, Pizo.
- VANDEN BEMPT, M. (1982, red.).  
*Kongreso en Belgio.* Leuven.
- WOJCIECHOWSKI, K. (1973).  
*Wychowanie dorosłych.*  
 Ossolineum, Wrocław.
- ZABOROWSKI, Z. (1985).  
*Trening interpersonalny.*  
 Ossolineum, Wrocław.

### **Porozumienie Przez Interakcje i Odczucia**

Współcześni psychologowie społeczni opracowali system przyswajania ważnych prawd o zachowaniach i uczuciach ludzi w toku tzw. *ćwiczeń wrażliwości* (treningu interpersonalnego). Względnie ich przybliżeniu oraz sprawozdaniu z badań, jakie autor prowadził w kilku krajach Europy (Belgia, Estonia, Finlandia, Francja, Niemcy, Szwajcaria, Szwecja) wśród lekarzy, nauczycieli i esperantystów, poświęcony jest ten artykuł.

Przedstawione badanie wykazuje, że obcowanie z sobą w grupie i konieczność komunikowania nastroczają kłopoty, nie uświadamiane przed zaistnieniem. Stopniowa ich redukcja następuje w wyniku świadomego dążenia uczestników; sam przekaz werbalny nie przynosi jednak wystarczającego poziomu umiejętności.

Badani wykazali określone uprzedzenia w stosunku do spotkanych osób, lecz także gotowość ich modyfikacji pod wpływem wzajemnego obcowania. Charakterystyczny był pozytywny kierunek większości

zmian. Poruszenie emocjonalne uczestników potwierdziło, że taki rodzaj obcowania (ukierunkowanego na planowe i racjonalne działania) sprzyja samopoznaniu i poznaniu innych, otwierając świadomość na zjawiska społeczne.

Wspólne doświadczenia powstawały w konkretnych sytuacjach i ujawniały się w zachowaniach poszczególnych osób. W grupie jednorodnej tylko jedna osoba wykazała wysoką odporność na wspólne doświadczenia, zachowując większość przyniesionych uprzedzeń.

W grupach esperantystów zwracała uwagę podatność na wspólne dochodzenie do odkryć oraz chłonność doświadczeń i znaczna otwartość, wyrażana w żywej ekspresji emocjonalnej, jaka nie pojawiła się jednak u Finów, niektórych Polaków i Holendra. Poszerzenie sfery doświadczeń o skrócenie dystansu społecznego stało się okazją do zachowań niestereotypowych, będących źródłem bogatej refleksji i wzruszeń.

1. **lernado**: estas ĉi tie komprenata kiel akirado de novaj spertoj per firmigo de ŝanĝoj en la ĝisnuna spertado de la persono, ekiĝantaj rezulte de lia (ŝia) aktivado; tiaj ŝanĝoj esprimiĝas objektivie en modifo de la kondutoj. (SZEWCZUK, 1979, p.318).
2. **streso**: Laŭ la difino de SEYLE (1977, p. 25,27): "neimplicita reago de organismo je ĉiuj postuloj adaptiĝi al tute nova situacio".
3. La esploradon aranĝis mia tiam Memstara Laborejo pri Medicina Sociologio de la Instituto.

## KOMUNIKIĜO INTER BESTOJ

### C. Støp-Bowitz\*

#### Difino

La ĉefa temo de la ĉi-jara Universala Kongreso estas "La rajto je komunikado". Sendube la formulintoj de tiu temo pensis nur pri komunikado inter homoj. Sed la bezono je komunikado estas esenca trajto de granda plimulto de animalaj organismoj, kaj mi intencas ĉi tie iomete prilumi tiun flankon de la komunikada demando, kiun oni apenaŭ tuŝas en aliaj kunsidoj, nome la komunikado inter bestoj.

Ekde la vulpo, la korniko aŭ la ansero en la fabeloj de Ezopo ĝis Donald Duck de Walt Disney kaj aliaj bestfiguroj de la modernaj desegnoserioj diversaj bestoj parolis. Ili parolas per homa voĉo, homaj vortoj; ili estas homaj kreaĵoj portantaj felon aŭ skvamojn, plumojn kaj vostojn. Ni bildigas nin mem tra ili, farante tiajn kreaĵojn paroliloj por niaj sentoj kaj filozofioj. Sed ĉu efektive bestoj kiel akridoj kaj formikoj, limakoj aŭ testudoj, moruoj kaj korvoj, ŝafoj aŭ simioj, posedas ideojn kaj emociojn similajn al la niaj? Pri tio ni ĝis nun ankoraŭ malmulton scias; sed la studoj de la zoologoj jam kolektis abundan materialon pri la sensoj, la komunikado kaj la konduto de bestoj.

Kio estas komunikado, aŭ komunkiĝo? Ĝeneralan simplan difinon oni povus formuli jene: "Biologia komunikado estas agado flanke de unu organismo, kiu, ŝanĝante la probablon de konduto en alia organismo, elvokas reagon de ĝi". Komunikado estas nek la signalo mem, nek la respondo, sed la rilato inter ambaŭ. Eĉ se unu besto signalas kaj la alia respondas, ne okazis komunikado, se ne ŝanĝiĝis la probablo de la respondo kompare al tia, kia ĝi estus sen la signalo.

Homa komunikado povas okazi sen konstatebla ŝanĝiĝo de konduto. Triviala

\* Profesoro en la Universitato de Oslo. – Prelego en la Internacia Somera Universitato, Rejkjaviko, 1977